# TEA-BULTENO

4ª JARO | FEBRUARO 2001 | NUMERO 2




## AGENDO



| | | |
|---|---|---|
| 1 | Ĵ | |
| 2 | V | Tradukado de triestaj kantoj kun Anita |
| 3 | S | |
| **4** | **D** | |
| 5 | L | |
| 6 | M | Ordigo de Hemeroteko |
| 7 | M | |
| 8 | Ĵ | |
| 9 | V | I luoghi oggi della Crociata contro gli Albigesi |
| 10 | S | |
| **11** | **D** | |
| 12 | L | |
| 13 | M | Ordigo de Tea-arkivo |
| 14 | M | |
| 15 | Ĵ | |
| 16 | V | Diskuto pri Strategia Laborplano de UEA |
| 17 | S | |
| **18** | **D** | |
| 19 | L | |
| 20 | M | Ordigo de Tea-arkivo |
| 21 | M | |
| 22 | Ĵ | |
| 23 | V | TOMBOLO |
| 24 | S | |
| **25** | **D** | **Sia en Udine** |
| 26 | L | |
| 27 | M | Ordigo de Tea-arkivo |
| 28 | M | |



**Semajno de ★**



**Internacia Amikeco**

**El Esperanta Proverbaro**

- ⇨ Pli bona sprito estas silento
- ⇨ Kio kostos malmulte, kostas plej kare

# Jara Asembleo de TEA

### Dimanĉon la 14an de januaro 2001

## Morala raporto de la Prezidanto

*Edvige Ackermann*

Estimataj Asocianoj, karaj geamikoj!

Ŝajnas strange, sed ni atingis la trian jarmilon! Kaj ni estas ankoraŭ ĉi tie, kune kun niaj problemoj, kun niaj esperoj, kun niaj klopodoj.

La lasta jaro ne estis facila jaro por nia Asocio: la sideja problemo ne solviĝis, la partopreno en la asocia agado lamis pli ol kutime kaj necese, personaj okazintaĵoj de kelkaj inter ni ne favoris pli intensan aktivecon.

Tamen grava decido estis prenita: okazigo en Triesto de la 70ª Itala Kongreso de Esperanto. La laboro por ĝia realigado startis jam en la monato de majo kaj verdire tre bone progresas. Lokaj Aŭtoritatuloj tre favore akceptis nin kaj promesis helpon kaj subtenon, tiel ke ni kuraĝas aserti ke tiu ĉi 70ª kongreso estos inter la plej altnivelaj. Modestaj ni estas, ĉu ne? Sed firme konvinkitaj.

Ĉiumonate ni klopodis raporti pri la paŝoj faritaj, pri la atingoj, pri la planoj kaj esperoj... bedaŭrinde ne multaj partoprenis kaj povis esti informitaj.

La kongresa temo estos: **Eŭropo 2001: Kulturoj - Lingvoj - Esperanto**. Ŝajnis oportune, por nia urbo, elekti tiun ĉi titolon, laŭ la instigoj de la Eŭropa Komunumo kiu proklamis 2001 «Eŭropa Jaro de Lingvoj». La prelegoj kaj teatraĵoj, kiujn ni ŝatus enprogramigi kaj prezenti, strikte rilatos al tiu temo kaj ĉio interplektiĝos kun la tradiciaj kongresaj laboroj, urbaj vizitoj kaj ekskursoj tra nia Regiono. Specialan atenton ni donos al programoj kiuj envolvos la loĝantojn de Triesto kaj de nia Regiono, ĉar ni opinias ke kongreso devas altiri la atenton de ekstera publiko, devas informi pri Esperanto, devas havi pozitivajn postsekvojn por nia Asocio kaj ĝenerale por Esperanto-movado.

Mi menciis la sidejan problemon. En la monato de decembro atingis nin la informo, ke nepre kaj senprokraste ni devos forlasi ĝin ĝis la fino de februaro 2004, kaj tio estis bona kaj trankviliga informo. Tio signifas, ke estas iom da tempo je nia dispono por eltrovi solvon. Sed kian solvon? Kiel jam dirite ekzistas nur du eblecoj: lui aŭ aĉeti. Luado estas ege multekosta kaj ne donas sekurecon kaj, krom la fakto ke ni ne havas la eblecon pagi tiajn sumojn, tio ne garantias ke post du-tri-kvar jaroj ni ne troviĝos en sama situacio.

Aĉetado estas la plej konvena solvo: ĝi donas stabilecon, neniu povos forĵeti nin, kaj la mono pagita almenaŭ permesos al ni posedi la ejon, kiu ĉiam pluhavos sian

valoron. Kompreneble niaj financoj ne permesas al ni aĉeti sidejon: vole-nevole ni devus prunti la necesan sumon de banko kaj repagi en 10-15 jaroj. La pruntita sumo ne povos esti tro alta, ni ja devas kalkuli repagon, sekve ni devos kontentiĝi je modesta sidejo, kiu tamen permesu al ni agadi. Plej oportune estus trovi sidejon ĉe teretaĝo kun vitrinoj, eble iama vendejo, kiu ebligu taŭgan reklamadon pri nia afero. Kiel ajn, la Asocio bezonus financan subtenon de ĉiu asociano, laŭ unuopaj eblecoj, ankaŭ ne grandaj sumoj estos bonvenaj. Mi proponas al vi bone pripensi kaj pridiskuti tion: se oni volas ke TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO pluvivu kaj agu, tiu ĉi estas la sola maniero por tion certigi. Se tio fiaskos, la 28ª de februaro 2004 estos la lasta tago de nia Asocio kaj tiu ĉi dato signos ĝian ĉesigon. Ĉesigo je ĝia 98ª vivojaro.

Mi menciis lamadon en la partopreno de la asocia aktiveco. Ĉu estas mia impreso, ke ĉi-jare la Asocio esti malpli vizitata ol en la pasinteco? Ĉu malpli da partopreno en la eksteraj agadoj? Vi aŭdos la raporton de la sekretario: ni faris multajn aferojn, konstante alvenas gratuloj el aliaj grupoj pro niaj kapablo kaj inventemo, sed vi kalkulu, tute silente, en kiom da programeroj vi partoprenis. Mi ne diras, ke ĉiam ĉio estas altnivela, interesega, ktp, sed ĉiam estas okazo praktiki la lingvon, esti kune, disvastigi niajn valorojn, informi pri Esperanto kaj internacia komunikado. Kunlaboru en la plibonigado de niaj vesperaj programoj, ne atendu ke la kutimaj kvar katoj faru ion kion poste vi kritikos: faru vi mem. Ankaŭ simpla partopreno helpas, sed despli bone se per io konkreta.

Mi adresas al vi specialan alvokon al kunlaborado en informado pri Esperanto, pri ebleco lerni la lingvon, pri partopreno en niaj agadoj. Nia Asocio bezonas multnombrigon de sia membraro: nur tiamaniere ni sukcesos savi ĝin, havigi al ĝi sidejon, instrui Esperanton, disvastigi la idealojn de Esperanto-movado.

# Agadraporto de la sekretario por la 2000ª jaro

*Elda Doerfler*

**Kara Tea-anoj!**

Nova jarcento, nova jarmilo komenciĝas, kaj ni survojas al ĝi per jam fiksita programo, cele la okazigon de Itala Kongreso en nia urbo. Pro tio nia tuta agado kaj atento dum la jaro 2000 plej parte direktiĝis al ties organizado kaj planado. Kaj nun, laŭtradicie, ni kune trarigardu la ordinaran aktivadon en la ĵus finiĝinta jaro.

**Programoj en klubejo**

Trafoliumante la ĉiumonate aperintajn Tea-bultenojn, oni povas legi en ties agendoj, ke ĉiu-marde oni okupiĝis pri ordigado de la arkivo, plus daŭra enkomputilado de libroj de nia biblioteko fare de Liliana Siega, aŭ oni kunsidis pritraktante la realigendajn aranĝojn ks, dum ĉiuvendrede okazis iu aparta programero, pli-malpli interesa, pli-malpli vizitata, kvankam ofte kio estis programita, fine entute ne efektiviĝis pro manko de interesitoj.

La plej ŝatataj aranĝoj daŭre estas projekciadoj de diapozitivoj: estis prezentitaj lumbildoj pri pejzaĝoj el la tuta mondo, nia pasinteco, Floroj kaj Bestoj, kaj UK en Israelo. Dum aliaj vesperoj oni aŭskultis muzikon, scivoleme kaj kun intereso trafoliumis albumojn de diverstemaj bildkartoj apartenantaj al pluraj kolektantoj, pasie kaj fervore kartludadis, kune legadis artikolojn el gazetaro, nuntempa kaj iama, aŭskultis raportojn pri vizititaj Esperanto-renkontiĝoj kaj navigadis interrete. Sekve de la decido organizi la italan kongreson en Triesto, kelkaj vesperoj estis dediĉitaj al informado pri la progresoj, kontaktoj, laboroj faritaj kaj farotaj.

Kristnaska Festo, plezurigita de la jam tradicia vizito de Paĉjo Kristnasko kiu malavare disdonis donacetojn al la ĉeestantaro, kaj Jarfina Festo konkludis brile kaj gajetose la programojn de la jaro 2000.

La kulinara arto ĉiam allogas TEA-anojn: fakte tre aprezitaj estis la januara tagmanĝo prizorgita de Susy kaj Silvio, la prezentado – ne nur vortume, sed ankaŭ gustume – de la kolbaseto de Ferrara en marto kaj la junia, tre vari-ingredienca, mediteranea vespermanĝo.

Gastoj, vizitintaj nin, elstare kontribuis al pliriĉigo de niaj programoj:

⇨januare, Fabrizio Pennacchietti, profesoro ĉe la Torina Universitato, prelegis pri «La Reĝino de Ŝebao – Legendo tra literaturaj fontoj judea, kristana kaj islama»;

⇨maje, samideano el Kanado, d-ro Geoffrey Greatex, rakontis pri sia urbo Halifax kaj loka esperanta aktivado;

⇨junie, Franko Luin kun siaj familianoj prezentis sian interretan laboron kaj traktis pri la movado en Svedio;

⇨julie, Marc VandenBempt el Leuven (Belgio) parolis pri la poresperanta aktivado en sia urbo, ĝin prezentante ankaŭ per diapozitivoj;

⇨aŭguste David Ferguson el Bruxelles parolis pri sia laboro kiel ĵurnalisto ene de Eŭropa Unio;

⇨Glauco Corrado plurfoje vizitis nin kun siaj familianoj, tiel vigligante niajn vesperojn.

**Tradiciaj Esperanto-renkontiĝoj**

**Semajno de Internacia Amikeco.** Post tombolo, okazinta vendrede la 25an de februaro en klubejo, dimanĉon la 27an oni vizitis, en la Muzeo de Hebrea Komunumo CARLO E VERA WAGNER, tre interesan ekspozicion «Yiddishland – Historio kaj bildoj pri la Hebreaj Komunumoj de centr-orienta Eŭropo tra poŝta dokumentaro». Post tio, tagmanĝo en sidejo: gustumado de la pladoj proponitaj de partoprenintoj en la Internacia Gastronomia Konkurso. Al la pli ol 30-kapa ĉeestantaro (niaregiona, eksterregiona kaj aŭstra) estis prezentitaj 12 diversnaciaj frandaĵoj, ĉiuj indaj ricevi la unuan premion. Varm- kaj amik-etose, ni konkludis tiele la festadon de SIA.

**Festo de Amikeco sur *Monte Forno*.** Tiu ĉi tradicia renkontiĝo ĉijare ne ricevis la meritatan atenton de TEA-anoj, ĉar malmultaj surgrimpis la monton la 10an de septembro. Nur grupeto renkontiĝis ĉe la landlima kruciĝo por kunfesti kun la aŭstra kaj slovena samideanaro.

**Zamenhofa Festo.** Por rememori la naskiĝdaton de nia Majstro, la 17an de decembro, estis organizitaj vizito de la ekspozicio: ELIZABETO EL AŬSTRIO, TRIESTO KAJ ITALIO kaj tagmanĝo ĉe TEA-sidejo. Ĉirkaŭ dudek personoj ĉeestis, allogitaj ĉefe de la 3ª Gastronomia Konkurso, kun ĉeftemo: la fazeoloj.

Post manĝado kaj premiado de la unuaj tri gajnintaj gekuiristoj, oni legis prilingvan artikolon de d-ro Zamenhof, kiun sekvis muziko: parto de la virina koruso IVAN GRBEC plezurigis nin per kortuŝaj kantoj, plejparte en Esperanto. Tiun saman programon ili refaris, malfruposttagmeze, ĉe la Bonfara Germana Asocio.

**Renkontiĝoj en nia regiono**

**Udine** – La 9an de aprilo NOVA ESPERO FRIULI kunlabore kun la asocio LEGAMBIENTE, zorgis pri plantado de la jam 3a arbo en la «Ĝardeno de Esperanto». Post mallonga ceremonio kaj subĉiela esperantlingva Diservo, sekvis vizito al ekspozicio pri Teksado kaj tagmanĝo ĉe hinda restoracio.

La 25an de junio, ĉiam organize de la Udina grupo, ni ĉeestis Diservon en Baziliko MADONNA DELLE GRAZIE, celebritan de pastro Nello Marcuzzi, antaŭ kio li mallonge parolis pri historio kaj celoj de Jubileo. Post tiu serioza parto, babilado en tipa loka gastejo, kun gustumado de vin- kaj gastronomi-specialaĵoj de Friulo.

En oktobro, alia jubilea aranĝo de NOVA ESPERO FRIULI konsistis el vizito, kun gvidado, de la Baziliko en Aquileia kaj posttagmeza meso ĉe Preĝejo MADONNA DELLE GRAZIE en Udine, sekvita de procesio en la ĉirkaŭaĵo.

**Esperantista pilgrimado al Monto Lussari** – Dimanĉon la 4an de junio pli ol dudeko da homoj el Aŭstrio, Italio kaj Slovenio telfere atingis la pinton de la monto, por ĉeesti Di-servon en la Sanktejo de Sankta Maria. Dum la germanlingva meso, itala kaj slovena esperantistoj legis internacilingve kelkajn partojn de la Liturgio kaj je la fino la pastro parolis pri Esperanto al la plejparte germanlingva fidelularo. Per cirkuleroj al paroĥestroj kaj katolikaj asocioj kaj anoncoj en lokaj ĵurnaloj ni propagandis ĉi tiun jubilean pilgrimadon.

**Pri kongresoj/konferencoj**. Ĉijare triestanoj partoprenis en la 85a UK (Tel-Aviv), 3a Eŭropunia Kongreso (Oostende), 12a Alp-Adria Konferenco (Ptuj), 69a Itala Kongreso (Casalecchio del Reno).

**Rutinaj priasociaj informoj**

Lamis en la pasinta jaro nia informagado. Malmultaj anoncoj estis publikigitaj en lokaj ĵurnaloj pro malaktivado de la koncerna responsulo. Edvige tamen trovis manieron por informi pri Esperanto, okaze de intervjuo ĉe privata televidstacio ANTENNA3 enkadre de programo pri protektado de bestoj: dum ĝi, ŝi kaptis la okazon paroli pri la Esperanta grupo de **KAT-AMIKARO**.

En majo kaj junio, ni aperis publike dum pluraj semajnfinoj, nome deĵorante ĉe la budo, starigita de Norina Cijan favore al bestoprotektado en centra urba loko: tie ni propagandis la **MANIFESTON 2000**, kio – kiel sciate – temas pri kampanjo, iniciatita de Nobel-pacpremiitoj ene de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco kaj Senperforto, kun la celo kolekti 100 milionojn da subskriboj, kiujn fine oni prezentis al la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, en septembro, okaze de la prifestado de la 50a datreveno de Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ni sukcesis kolekti pli ol 400 subskribojn, samtempe disdonante informojn kaj informilojn pri nia lingvo. Pri ĉio ĉi aperis anoncoj en triestaj ĵurnaloj kaj oni informis eĉ radie kaj ĉe privata televizio. Por tiu sukcesa laboro ni ricevis eĉ la gratulojn de Ĝenerala UEA-Direktoro, Osmo Buller.

La estraranoj kunsidis entute 6 fojojn. La asocia informilo TEA-BULTENO regule aperis ĉiumonate, sen somera paŭzo.

Energio kaj laboremo de la estraro estis streĉe dediĉataj, depost majo, nome post la konfirmo de Itala Federacio pri okazigo en Triesto de la nacia kongreso, al preparado, planado, programado, organizado de la aranĝo. Fulme estis faritaj la aliĝiloj, buntaj kaj allogaj, kiujn oni sendis al Israelo, por enmetigado en la kongresajn dokumentujojn. Alitipaj estis faritaj kaj presitaj per nia aparato kaj forsenditaj al ĉiuj italaj grupoj kaj pluraj unuopuloj. Hoteloj jam estas kontaktitaj, dum ĉiuj aliĝintoj ricevis hotel-mendilojn, kompletan liston de tranokteblecoj, plus la provizoran programon. Intense ni propagandis, kaj propagandas, la kongreson pere de nia gazetaro kaj interrete: oni sukcesis prepari TTT-paĝaron, konsulteblan ĉe http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html. Same rilatas al propagando la pretigado de prikongresaj bildkartoj kaj glumarkoj, kies grafikon prizorgis nia kompetenta Eraldo Sepulcri. Ĝis nun aliĝis 74 personoj el diversaj landoj: la plejparto el Italio, aliaj el Aŭstrio, Belgio, Japanio, Slovenio kaj Ukrainio. Sed ni estas nur kvaron-voje: la plejmulto estas farenda. Bezonatas tradukantoj, ĉiĉeronoj, unuvorte konstantaj helpantoj kaj kunlaborantoj. La laboro estas multa kaj tre varia, kaj certe vi sukcesos trovi kion vi plej facile kapablas plenumi – gravas nur la deziro kaj volo igi ĉi tiun kongreson absolute neforgesebla, por la partoprenontoj kaj – ĉiukaze! – por la organizantoj!

## Rezultoj de la balotado okazinta dum la Jarasembleo

La gvidantaro de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO por la jaro 2001, jaro de la 70a Itala Kongreso, konsistas el la jenaj personoj:

**Estraro**

**Ackermann Edvige** - *prezidanto*
**Zerpini Elena** - *vicprezidanto*
**Doerfler Elda** - *sekretario*
**Valle Giuseppe** - *kasisto*
**Siega Liliana** - *konsilanto-bibliotekisto*

**Administraj revizoroj**

**Nocent Elio kaj Zerpini Amalia**

---

*Kvankam iom malfrue, tamen publikiginda kaj vere leginda pro la signifoplena enhavo, jen la Novjara mesaĝo de la UEA-Prezidanto – Kep Enderby*

## Per paca armilo en nova jarmilo

Tiom UEA vastiĝis tra la mondo ke la tradicia novjara mesaĝo devus esti sendita plurajn fojojn tra la jaro. Multaj el niaj membroj festas la novan jaron nun, sed ekzistas ankaŭ multaj kiuj festos ĝin post kelkaj tagoj; aliaj, kiuj festos ĝin en marto aŭ septembro; aliaj, kiuj nun festas ne la novan jaron sed Ramadanon; kaj certe eĉ aliaj. Ĉiukaze, pro respekto al la tradicio, ni restu ĉe la komenco de la kristana kalendaro.

Novjara mesaĝo estas okazo por pritaksi kun kritika distanco la evoluon dum la pasinta jaro kaj por esprimi dezirojn pri la evoluo en la posta jaro.

La Esperanto-movado dum la jaro 2000 daŭrigis sian kutiman kreskon. Ne lasu ke misgvidu vin la membronombro de ĉi tiu aŭ de aliaj organizaĵoj. En efektiveco, ĉi-momente Esperanto kreskas, foje eĉ tumulte, en regionoj kiuj ne eniras la bonkondutan cirklon de la ok plej industriaj landoj en la mondo.

Ekster tiuj ok landoj esperantistoj apenaŭ povas revi pagi kotizojn aŭ aĉeti librojn eldonatajn en tradicie fortaj

bazoj de la movado. Defio staras antaŭ **UEA** kaj la ceteraj organizaĵoj: ĉu ni sukcesos trovi manierojn enplekti tiujn homojn en la vivon de Esperantujo? Nia himno nenie asertas, ke la flugiloj de facila vento devas porti la novan senton nur de riĉa loko al riĉa loko.

Se vi do vivas en lando, kie ne estas problemo pagi la kotizon de individua membro, bonvolu fari tion. Per tio vi helpos ĉiujn agadojn de **UEA** (ekde disvastigo de Esperanto inter la junularo aŭ en la Interreta mondo ĝis helpo al la movado en Afriko aŭ Nepalo). Jen kiel, fakte, oni elspezos la monon de via kotizo. Krome, vi aliĝos al la rondo de la esperantistoj plej bone informataj per la plej legata Esperanto-revuo, kaj vi estos inter la plej favorataj partoprenantoj de Universalaj Kongresoj, aĉetantoj de libroj kun rabatoj ktp.

Estas nun finiĝanta **KAMPANJO 2000**, kiun sindediĉe sekvis la esperantistaro en multaj landoj. Ĝi portis kelkajn sukcesojn, dum ĉe iuj agad-flankoj progreso forestas. **UEA**, kiel reprezentanto de la monda esperantistaro, regajnis ĉiujn ŝanceliĝintajn poziciojn ĉe internaciaj organizaĵoj, kiel UN kaj **UNESKO** kaj aliaj ankoraŭ, kaj ĝuste en la dua duono de la jaro 2000 atingis pliajn rezultojn. Esperantistoj estis petataj prelegi en **UNESKO** mem al la tuta mondo de neregistaraj organizaĵoj. Neniu ridetis kaj neniu primokis, multaj eĉ petis rilati kun ni. Same okazas en UN, kie, danke al la refortigita Novjorka Oficejo, oni komencas ricevi de pluraj flankoj subtenojn por la rezolucio de la Seula konferenco de NRO-j (1999), kiu postulas ke UN finfine alfrontu la problemon de lingvaj homaj rajtoj kaj la eblan solvon pere de neŭtrala lingvo.

En ĉiuj kontinentoj esperantistoj komencas funkciigi ĉiam pli sukcese siajn kontinentajn aŭ landarajn Esperanto-asociojn, -uniojn kaj -komisionojn.

Mi ne povas ne mencii la amerikajn kaj aziajn kongresojn, kiel brilajn ekzemplojn de tio kion oni faras. Mi ne povas ne mencii la reviglîĝon de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu eble siavice revigligos kelkajn "Esperanto-agade" marĝenajn eŭropajn landojn. Mi certas, ke eŭropaj esperantistoj kapablos ĝis maksimumo ekspluati la eblojn kiujn prezentas la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001, por montri al la mondo, kiu vere volas subteni plurlingvecon kaj sekurigi la plu-ekziston de naciaj lingvoj.

Apud la tradiciaj rimedoj por Esperanto-agado pli kaj pli ekspansias io nova: Interreto. Estas vere mirinde konstati kiel rapide esperantistoj sukcesis adaptiĝi al ĉi tiu moderna komunik-rimedo kaj utiligi ĝin por Esperanto.

Tiu kampo certe prezentas al ni multajn eblojn (mi ne kaŝu de vi ke multaj novaj esperantistoj en multaj malnovaj landoj varbiĝas pere de interretaj kursoj). **UEA** kaj la ceteraj organizaĵoj devus, laŭ mi, iom pli kuraĝe plonĝi en ĉi tiun maregon, kie oni trovas amason da junaj kaj interesaj homoj. Ĝuste tiajn homojn ni bezonas.

Ĉar ni parolas pri junaj homoj, estas oportune mencii la labor-streĉojn de nia junulara sekcio **TEJO**, kiu rekomencas produkti novajn ideojn kaj novajn sukcesajn agadojn. Mi apelacias al ĉiuj legantoj de ĉi tiu mesaĝo, junaj kaj maljunaj, ke ili klopodu superi organizajn kaj aĝajn limojn kaj antaŭenigi kunlaboron. Ĉiu plia novjara mesaĝo fakte portas nin pli proksimen al la momento kiam la **TEJO**-homoj devos transpreni la torĉon (kaj mem verki siajn novjarajn mesaĝojn). Same mi petas ĉies kunlaboron por **ILEI**, nia instruista brako. Apenaŭ necesas diri ke kie oni ne instruas Esperanton, oni ne kreas esperantistojn. Instruado havas fortan lokon en la nun diskutata nova laborplano de **UEA**.

Mi ne povas fini ĉi tiun mesaĝon sen du lastaj konsideroj. Niaj fakaj asocioj devas fortiĝi, por apliki Esperanton en la praktiko. Nur kiam Esperanto estos lingvo per kiu oni povas aĉeti kamionon en Eŭropo kaj sendi ĝin al Afriko, tiam Esperanto komencos esti vere normale internacia lingvo.

Mi parolis pri kamionoj kaj komercado, sed ne estas malsame pri spiritaj kaj kulturaj varoj. Kiel ĉiam okazis en la pasinteco, ekzistas fortoj en la mondo kiuj postulas rezigni je demokratio favore al ekonomia efikeco.

Ne estas strange ke tiujn ideojn subtenas ĉefe tiuj kiuj estas (aŭ esperas esti) ekonomie fortaj. Ni apartenas, laŭ mi, al la alia flanko, al tiuj kiuj postulas ke la homo estu en la centro de la atento, kiuj pensas ke ekonomia evoluo havas sencon nur se ĝi plifeliĉigas, ne se ĝi mortigas la homon per malsanoj aŭ detruante lian mondon. Ni postulas ke ankaŭ en la lingva kaj kultura kampo estu demokratio, ke neniu humiliĝu kaj submetiĝu. Tion ni diru laŭte kaj klare en ĉiuj forumoj en kiuj ni havos la eblon paroli dum la venonta jaro. Interne de la movado, ĉiuj bonvolu partopreni la diskutojn pri la labor-plano, kies slogana resumo estas ĝuste: Al lingva demokratio!

Bondezirojn al vi kaj al Esperanto en la jaro 2001$^{a}$.

*(El Ret-Info - Gazetaraj Komunikoj de UEA)*

## Esperanto Koresponda Servo

Por tiuj kiuj volas trovi korespondantojn en aliaj landoj, bonvolu rigardi la paĝon de la **ESPERANTO KORESPONDA SERVO** <http://members.aol.com/enrike/ekspeto.htm>

## SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO
## 19-25 februaro 2001

Okaze de **SIA**, E-rondeto en urbo Vyskov (CZ) preparas ekspozicion pri Esperanto. Inaŭguro: la 26$^{an}$ de februaro. Ekspoziciotaj estos ankaŭ ricevitaj bildakartaj kaj retmesaĝaj salutoj. Ĉion sendu al: Esperanto-rondeto, MKS (Urba Kulturcentro) - J. Soupala 4 - CZ-682 01 Vyskov, Ĉeĥio aŭ ĉe: vojacek@jumbo.ped.muni.cz

## El la agendo, bonvolu noti ke ...

✓ la 2$^{an}$ de februaro, ni kleriĝos kaj amuziĝos tradukante triestajn kantojn al esperanto: nia gvidanto estos Anita!

✓ la 9$^{an}$, okazos itallingva prelego, kun diapozitivoj, pri historiaj faktoj, fare de Edvino Vatta;

✓ la 23$^{an}$, Amikeca Tombolo - pli bone ol gajno en Loterio!

✓ kaj .... fine, dimanĉon la 25$^{an}$, ĉiuj al Udine - En preparo, zorge de **NOVA ESPERO FRIULI**, interesa programo, antaŭvidanta i.a. viziton de la ekspozicio **ORAĴOJ DE AVAROJ**, kiu prezentas pli ol 1200 objektojn elfositajn diversloke en Hungario kaj Italio.

**BULTENO** de la membroj de
**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; esperantotrieste@adriacom.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349